# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 17/02/2022 Kvincentsepdeka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

****************************************

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro*
*lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*

*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

****************************************

**Forĵetu viajn vortarojn. Uzu *Google Translate* kiel vortaron**

****************************************

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**
Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo
Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)
**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

****************************************

## Entute 770,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **293,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)
Nun studas **195,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)
Nun studas **175,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)
Nun studas **107,000** lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )
Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

****************************************

## Surhavu vizaĝmaskon.



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.**

Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Do portu maskojn. *Roger Springer*

****************************************



la esperanta retradio



## DONAS BONAN CIRKAŬ-5- MINUTAN AŬSKULTADON/LEGADON ĈIUN TAGON. RAPIDA TESTO PRECIZA KIEL PCR-TESTO

10a Feb 2022

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



## EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER"

(de Mason Stuttard). Numero 3 de "Por progresantoj".

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

POR RESPONDI AL LA DEMANDOJ, LEGU EN ĈI TIU A.E. 570
LA ARTIKOLON "La genio de Esperanto kaj do de Zamenhof".

1). Kiuj eŭropaĵoj mankas en la Esperanta verbsistemo?
2). Kion vi faru pri la Zamenhofa pasivvoĉa "La fiŝo estas de ni manĝota hodiaŭvespere".
3). Kiujn formojn havas en Esperanto la verboj?
4). Kion oni ŝanĝas en la verbo se oni ŝanĝas frazon de la aktiva al la pasiva voĉo?
5). Kiu frazparto estas la infinitivo en la frazo "Ili venis ludi briĝon.".
6). Ĉu adjektivoj kun "-anta" kaj "-ata" indikas tempon?
7). Kiaj frazoj ne povas fariĝi demandoj?
8). Ŝanĝu "Ili manĝu!" al demando.

Vi trovos la solvojn PROKSIMAN SEMAJNON en A.E. numero 571. *Marcel Leereveld.*

WORLDBEYONDWAR.org
a global movement to end all wars

Militarismo Kaj Klimata Ŝanĝo: Katastrofoj Progresantaj.



## La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo, kunvenas je 10.30 atm ĝis 12tm je la unua kaj tria sabatoj de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 19a de februaro estos la tria sabato. Venu! *Roger Springer*

**3ZZZ** La temoj de la elsendo de la 14a de februaro estas la pandemio, vikipedio kaj kiel oni kreskigas insektojn kiel kokcinelojn. *Franciska Toubale*



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917



# La genio de Esperanto.

**DO DE ZAMENHOF.**

En la Esperanta verbsistemo mankas kompreneble la multaj esceptoj de la naciaj lingvoj, sed ankaŭ la resto estas genia. Mankas la kombinitaj verboj, kiuj en Esperanto esprimiĝas per adjektivoj, kaj la futuro havas nur unu vorton, same kiel la pasiva voĉo, kiuj ja signifas nur unu tempon, nur unu agon. La veraj verboj havas nur la solajn verbfinaĵojn, nome -as, -is, -os, por la tempoj de la indikativo, -u por la imperativo, -us por la duobla subjunktivo, kaj –i por la infinitivo. La imperativo etendiĝas de la plej forta ordono al la plej malforta deziro; adverboj indikas la fortecon. La infinitivo tre ofte ne agas kiel verbo, sed kiel substantivo. Ŝanĝo de la radiko de verbo neniam okazas. La pasiva voĉo formiĝas per la sufikso "-ati" kaj la mediala voĉo (ofte malfacila en naturaj lingvoj) per la sufikso "-iĝi". Ekzistas ankaŭ la faktitiva voĉo, per la sufikso "-igi". Helpverboj estas nur sep aŭ ok; en la aliaj kazoj la infinitivo estas substantiva kaj aŭ objekto aŭ prepozitiva ("Ni iris (por) aĉeti lakton"). La dusenca formo en la franca lingvo esprimiĝas aŭ per "Mi estas manĝinta" k.t.p. (la origina signifo), aŭ per la simpla "Mi manĝis" k.t.p. (la nova signifo). La akuzativo por la objekto de la transitiva verbo estas deviga kie eblas, sed ne povas ŝanĝati al prepozicio "al" aŭ alia. La sufiksoj –inta kaj –ita (ili ne estas verboj!) indikas la pasintan tempon de la ago en la radiko de la adjektivo; la sufiksoj -onta kaj –ota (ne ekzistantaj en plej multaj naciaj lingvoj) indikas la estontan tempon de la ago en la radiko de la adjektivo; kaj la sufiksoj –anta kaj –ata (ne ekzistantaj en naciaj lingvoj) indikas la daŭran tempon nefinitan de la ago de la radiko de la adjektivo ("Mi estis manĝanta"). La demandoj formatas, metante la subjunkcion "Ĉu" antaŭ la aserton kaj uzante pli altan tonon aŭ demandsignon ĉe la fino de la aserto: "Vi povos veni hodiaŭ." > "(Mi demandas) Ĉu vi povos veni hodiaŭ?". Kaj "Ĉu vi vizitus la prezidiston, se vi estus en Usono?".

P.S. Zamenhof kreis neuzindan pasivan voĉon kun du verboj por unu ago: "La hundo estis batata de la viro".

*Marcel Leereveld.*

Baldaŭ aŭstralianoj voĉdonos por decidi kiuj kontrolas la novan parlamenton.
Ĉu vi remarkas ke neniu partio subtenas pacon?
Ĉu milito aŭ paco ne estas la plej granda decido por la popolo?
Ĉu la problemo estas ke militi aŭ ne, ne estas decido de Aŭstralianoj sed de Britujo aŭ Usono?
Nur la *Green* partio subtenas pacon sed ne kiel grandan celon. Kial??

*Roger Springer*

## Usono havas 940 konvirusajn mortojn kontraŭ unu konvirusa morto en Ĉinio

U.S. has 940 times as high a death-rate from covid as China does. – The Greanville Post

Kial homoj detruas ĉion en militoj dum la profito apartenas nur al fiulaj regantoj
Ne eblas voĉdoni kontraŭ milito.




NATO ekiĝis kiel kontraŭ Rusia milita grupo.

Rusio deziras ke ĝia alproksimado al siaj landlimoj haltu.



Sed La ukraina krizo neniel rilatas al Ukrainujo. Temas pri la gasdukto, kiu ligas Germanujon al Rusujo, nomata *Nord Stream 2*. Vaŝingtono vidas la dukton kiel minacon al ĝia supereco en Eŭropo.

[What Putin Wants / Mike Whitney dissects the Russia—NATO standoff – The Greanville Post]

*Roger Springer*